



The American ESPERANTO JOURNAL

COPYRIGHT, 1908, BY THE AMERICAN ESPERANTO COMPANY


MODELO No. 12.

**VIDEBLECO
SIMPLECO
FORTIHECO**

Intersangeblaj

Literar-

Portiloj



**LA
SKRIBMAŜINO
POR
ESPERANTISTOJ**

Meĥanike

Unuformaj

Presajoj

LA HAMMOND'A SKRIBMAŜINO

qazwsxedcrfvtgb yhnujmikŝolĉpĵĝ
QAZWSXEDCRFVTGB YHNUJMIKŜOLĈPĴĜ
1" 2+ '3\$ ^4x^5!- 6ĥ;7':8(,9).0?ŭ

LA INTERŜANGEBLA LITERARO

THE HAMMOND TYPEWRITER CO.,
SIXTY-NINTH STREET AND EAST RIVER, NEW YORK, N. Y., U. S. A.

ESPERANTO ORGANIZATIONS IN THE UNITED STATES

<i>Name of Organization</i>	<i>Corresponding Officer.</i>
AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION	J. F. Twombly, Boulevard Station, Boston, Mass.
Los Angeles Esperanto Association	Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.
Auxiliary Language Association	Prof. James Main Dixon, University of S. California, Los Angeles, Cal.
San Diego Esperanto Society	Dr. C. G. Gearn, 2545 Front St., San Diego Cal.
Colorado Esperanto Association	Mrs. Maude W. Miks, 2622 Gilpin St., Denver, Col.
New Britain Esperanto Club	Rolland B. Moore, Box 700, New Britain, Conn.
Washington Esperanto Society	Charles W. Stewart, 1211 Kenyon St., N. W., Washington, D. C.
Emory Esperanto Club	Jack Dempsey, Emory College, Oxford, Ga.
Illinois Esperanto Association	Edwin C. Reed, Ashton Block, Rockford, Ill.
Chicago Esperanto Society	J. Howard Pearson, 551 S. Waller Ave., Chicago, Ill.
Leibniz Esperanto Club	Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.
University of Chicago Esperanto Society	Charles F. McElroy, 5520 Madison Ave., Chicago, Ill.
Elgin Esperanto Society	Joseph J. Burita, 114 Crighton Ave., Elgin, Ill.
La Juna Stelaro	D. A. Johnston, Y. M. C. A., Rockford, Ill.
Rockford Esperanto Society	Derwent Whittlesey, 1815 Elm St., Rockford, Ill.
Augustana College Esperanto Society	Charles H. Froding, Augustana College, Rock Island, Ill.
Indiana Esperanto Association	Mrs. Winifred S. Stoner, U. S. Marine Hospital, Evansville, Ind.
Juna Espero Esperanto Society	Miss Julia Bierbower, 610 Upper First St., Evansville, Ind.
Non Nobis Solum Esperanto Club	Miss Sadie Rucker, 1205 Chandler Ave., Evansville, Ind.
Indianapolis Esperanto Society	Miss Mary McEvoy, 21 E. Ohio St., Indianapolis, Ind.
Kansas State Agri. Coll. Esperanto Club	Prof. Herbert F. Roberts, M.S., Manhattan, Kan.
Pretty Prairie Esperanto Society	R. C. Voran, Pretty Prairie, Kan.
Portland Esperanto Society	Herbert Harris, The Churchill, Portland, Me.
L'Espero Esperanto Society	Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Me.
Mass. Agri. Coll. Esperanto Club	E. Victor Bennett, 25 North College, Amherst, Mass.
Boston Esperanto Society	Edward K. Harvey, Mass. Institute of Technology, Boston, Mass.
Esperantaj Pioniroj	William J. Graham, Perkins Institution, South Boston, Mass.
Kautabrigia Esperanta Grupo	Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.
Harvard Esperanto Society	N. W. Frost, 32 Hollis Hall, Cambridge, Mass.
Marsh Esperanto Club	F. W. Woolway, 77 Union St., Newton Centre, Mass.
Worcester Esperanto Society	Herbert K. Cummings, Worcester Polytechnic Institute, Worcester, Mass.
Winona Esperanto Club	Thomas B. Hill, 309 E. Fifth St., Winona, Minn.
Belvirino College Esperanto Society	Dr. E. W. Doran, Belvirino College, West Point, Miss.
St. Joseph Esperanto Society	Mrs. Josephine Riley, 807 North 22nd St., St. Joseph, Mo.
Good Templars Esperanto Club	Harry C. Walsh, care of M. M. Co., Missoula, Mont.
First Nebraska Esperanto Club	Mrs. E. A. Russell, Ord, Nebr.
Searchlight Esperanto Club	Dr. E. W. Newell, Searchlight, Nev.
New York State Esperanto Association	Andrew Kangas, 1061 Prospect Ave., New York City, N. Y.
Auburn Esperanto Society	Clarence F. Welsh, Recorder's Office, Auburn, N. Y.
Brooklyn Esperanto Society	Durbin Van Vleck, 154 Hancock St., Brooklyn, N. Y.
Cornell University Esperanto Society	Miss Margaret Curtis, Sage Cottage, Ithaca, N. Y.
New York Esperanto Society	Andrew Kangas, 1061 Prospect Ave., New York City, N. Y.
Columbus Esperanto Society	Miss Carrie Southard, 1432 Highland Ave., Columbus, O.
Esperanto Club of Ohio State University	Charles W. Park, Ohio State University, Columbus, O.
Toledo Esperanto Club	H. S. Blaine, Box 999, Toledo, O.
Philadelphia Esperanto Society	E. Clive Hammond, 1711 Summer St., Philadelphia, Pa.
Warren Esperanto Club	W. L. MacGowan, Supt. of Schools, Warren, Pa.
Providence Esperanto Group	Frederick E. Cooper, 11 Hayes St., Providence, R. I.
Jamestown Esperanto Society	Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.
Putney Esperanto Society	Rev. Herbert E. Buffam, Putney, Vt.
Seattle Esperanto Society	William G. Adams, 309 Twenty-seventh Ave., Seattle, Wash.

INSTRUCTION BY MAIL

INTRODUCTORY AND ADVANCED COURSES IN

ESPERANTO

CHIEF INSTRUCTORS:

Prof. E. C. REED, D. B. E. A., District Councilor Am. Esp. Ass., Sec'y-Treas. Illinois Esp. Ass.
 Prof. FLOYD P. HARDIN, D. B. E. A., Hon. Prcs. Univ. of Chicago Esp. Society
 Prof. DERWENT WHITTLESEY, D. B. E. A., Councilor Illinois Esp. Ass.

FOR BOOKLET DESCRIPTIVE OF OUR COURSES ADDRESS THE

AMERICAN SCHOOL OF ESPERANTO

407 ASHTON BLOCK, ROCKFORD, ILLINOIS



THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL



Copyright, 1908, by The American Esperanto Company.

A MONTHLY MAGAZINE DEVOTED TO THE INTERNATIONAL LANGUAGE.

Entered as second-class matter, January 6, 1908, at the Post Office, New York, N. Y., under the Act of Congress of March 3, 1879.

PUBLISHED BY THE AMERICAN ESPERANTO COMPANY
150 NASSAU STREET NEW YORK CITY, U. S. A.

CABLE ADDRESS: ESPERANTO NEW YORK.

Vol. II. No. 3. (15).

MARCH, 1908.

PRICE, 10 CENTS.

SUBSCRIPTION PRICE

One Year \$1.00
Six Months50
Subscriptions can commence
with any number.

The Editor reserves the right to correct all manuscripts. Unavailable contributions he will return IF the writer sends postage stamps or international coupons, but not otherwise.

If contributions are not typewritten, they must be very carefully written by hand.

Articles on distinctively American subjects will be especially appreciated by the Editor.

ADVERTISEMENTS

For advertising rates, see fourth page of cover.

"NI KREDAS JE LA NETUŝBLECO DE LA ESPERANTA FUNDAMENTO ZAMENHOFA"

Important Notice

The American Esperanto Company, true to its promise to give to the American Esperantists just as good a publication as they would support; is pleased to announce that it has secured the services of several prominent Esperantists, who will join the editorial staff of THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, Mr. Dodge finding himself obliged to relinquish his editorial work on the publication. Our readers may now look for brilliant contributions from the pen of one of the most expert Esperantists of the world, as we have obtained the promise of Mr. Edmond Privat, A.B., of Geneva, Switzerland, that he will be one of our constant collaborators. Mr. Privat needs no introduction; he is known and esteemed wherever Esperanto is studied. His visit to America has been of inestimable good to the propaganda work throughout this country and we sincerely hope that he will return to us after the Dresden Congress.

We have received many letters of congratulation concerning the change in the appearance and quality of our magazine and we wish to thank the writers most sincerely for their kind words. But we desire not only praise but also criticism and suggestions. Tell us what you consider our publication lacks and we will try to supply the want. The Editor is ready to increase the number of pages by four or even eight if the support given us will render such an extra expenditure possible. By obtaining new subscribers for THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL you will gain more for the money you have already paid out. The American Esperanto Company is not satisfied with its present publication. We desire to make our JOURNAL the best Esperanto magazine in the world. We can and will if you assist us; we cannot unless you do.

Beginning with the April issue we will make a special feature of our Chronicle. The popular demand is that this department appear entirely in English and accordingly will. We believe that the Esperantists want, first of all, the *news* of the movement *both here and abroad*. We will spare neither time nor expense to keep our Chronicle up to date.

Eminentaj Usonanoj: Mark Twain

LA proksiman 30an de novembro Samuele Langhorne Clemens, plifamata per lia plumnomo, Mark Twain, estos sepdektrijara. Li naskiĝis en la malgranda urbo Florida, en la usonero Missouri, 1835.

Li estas la filo de Johano Marshall Clemens kaj Johanino Lampton Clemens. Lia patro estis klera homo sed neriĉa, kaj kiam li mortis la familio estis lasata en malriĉeco. Por fari sian parton, la juna Clemens iris al Hannibal, Mo., ĉe l' aĝo de dektri jaroj, kaj fariĝis kompostisto, je kiu metio li laboris ankaŭ en New York kaj Philadelphia.

Lia ambicio, knabo, ĉiam estis esti piloto sur la rivero Mississippi, kaj kiam iafoje la oportuneco alvenis por tiu pozicio li ĝin ekprenis. Estis liaj spertaĵoj kiel piloto kiuj lin helpis en liaj libroj, "Vivo Sur la Mississippi," kaj "Antaŭaj Tempoj Sur la Mississippi." Poste li fariĝis privatsekretario al sia frato.

De tio li iris al la minoj de Nevada, pri kiuj li ofte skribis. Tiam, en 1882, li fariĝis redaktoro de tagĵurnalo en Virginia City, Nev.; li iris al San Francisco, estis tie ĵurnalistoj, kaj laboris en la minoj de Calaveras.

Dum ĉiu ĉi tempo li verkis artikolojn por la diversaj ĵurnaloj usonaj, rimarkindajn pro ilia troema ŝercemo, kaj tiuj ĉi ricevis multe da ŝato ĉie. Li donis paroladojn, en kiuj la aŭdantoj rimarkis tute al ili novan noton de humoro sarkasma sed ne malbonvola, kaj estas ne longatempe antaŭ ol li fariĝis fama kiel unika humoristo.

Lia rakonteto "La Saltanta Rano de Cala-

veras'a Graflando," priskribante malfeliĉan besteton kiun sentaŭgulo plenigis per papilketoj por gajni veton, famigis lian nomon pro la stranga kaj ridiga stilo en kiu li ĝin verkis.


Sed kiam li eldonis sian libron, "La Aventuroj de Tom Sawyer," tiam efektive oni lin lokis en la plejaltajn rangojn de rakontverkistoj. La libro priskribas la vivon kaj strangajn aventurojn de ordinara sudusona knabo, kaj plenigas per tia riĉeco de detaloj de la vivado en tiu regiono ke ĝi estas preskaŭ klasikaĵo.

Mark Twain — sed unue, oni klarigu al la fremda leganto kiel li elektis tiun plumnomon. Ĝi devenas de la krio kiun li ofte aŭdis, knabo, kiam la mezuristo de la profundeco de l' Mississippi'a rivero faris al sia kunulo; "mark twain"—en Esperanto: "registru du"—signifas ke la sondilo atingis ĝis du fatomoj (fathoms); fatomo estas ses futoj. La konveneco de la unua vorto esti samaĵo kiel baptonomo (Marko)

faris la du vortojn facile uzeblaj kiel pseŭdonimo.

Mark Twain, do, ĉirkaŭ 1865, iris Europon, kie, kune kun kelkaj amikoj (je la fratino de unu el kiuj li poste edziĝis), li vojaĝis en multaj landoj. Li skribis pri tiu vojaĝo en la libroj, "La Senkulpuloj Fremdalande," "Piedmarŝo Fremdalande," kaj "Tom Sawyer Fremdalande." Tiuj ĉi libroj estis tiel popularaj ke li vendis milojn da ili, kaj lia famo kreskis.

Aliaj libroj de Mark Twain estas: "La Orumita Epoko," kiu priskribas vivon en



Copyright, by the U. S. Lithographic Co., New York.

MARK TWAIN (SAMUELO L. CLEMENS).

Washington, D. C., kaj en kiu estas la fama karakterulo *Kolonelo Sellers* la eksterordinara optimisto; "La Reĝido kaj la Malriĉuleto," kiu estas historio montranta kiamaniere unu el la junaj anglaj princoj ŝanĝis lokojn kun malgranda almozulo kiu strange similis al li; "La Aventuroj de Huckleberry Finn," kiuj estas tiuj de kunulo de *Tom Sawyer*—kaj

iaj personoj opinias ke tiu ĉi libro superas "Tom Sawyer"; kaj "Usonano Ĉe l' Kortego de Reĝo Arturo," fantazia miksaĵo de mezepoka kaj moderna tempoj. Tute, li verkis ĉirkaŭe dudekkvin librojn. La plej antaŭnelongaj libroj de Mark Twain ne estas tiel ŝercaj plenaj kiel liaj antaŭaj, ĉar li povas esti tre serioza kelktempe, kaj liaj seriozaj vortoj atingas—de pensemaj personoj—tiom da atento kiom liaj humoristaj.

En 1884 Mark Twain fondis la eldonistan firmon C. L. Webster & Ko., kiu eldonis kelkajn verkojn, el kiuj unu estas la fama "Memoraĵoj de Generalo Grant." La profitoj de tiu ĉi volumo estis grandegaj, kaj oni diris ke la dividado kiun ricevis la vidvino de la generalo estas \$350,000 (700,000 sm.).

Sed la firmo, escepte pri tio, ne estis sukcesa. Ĝi bankrotis, kaj la ŝuldoj estis multaj. Mark Twain ne estis persone respondanta je ili, sed li anoncis ke li sin konsideras tiel. Post la malsukceso li denove paroladis, tiun ĉi tempon tra la mondo, kaj post multaj jaroj li pagis plene la ŝuldojn, kvankam la kreditoroj estis oferintaj ricevi la duonon de ili kiel tutan pagon.

Tiu ĉi okazintaĵo min alprenas al la ŝlosilnoto de tiu ĉi artikolo, kiu estas ke Mark Twain, kiel tipa reprezentanto de ĉio kiu estas usona aŭ usonema, estas eble hodiaŭ la plej amata homo en tiu ĉi lando.

Li estis el bona familio, sed lia juna vivo, simila al tiu de la plejbonaj viroj kiuj atingis

poste sukceson, estis malfacila kaj suferata. Sed lin malfeliĉaĵoj kaj malfacilaĵoj dolĉigis, ne malmoligis. Li rigardas vivon tra okulvitroj kiuj ŝajnigas la bonecon bonegco kaj la malbonecon pardonebla. Kvankam li posedas fortan stilon sin esprimi, kaj kelkfoje maldolĉan langon, mi dubis ĉu li havas unu malamikon en la mondo.

Mark Twain, naskiĝinte en sudusono, antaŭ la Interŝtata Milito, kompreneble kutimis nature al la ideo de la sklaveco de la negruloj. Pri tio ĉi li skribis, en la *North American Review*:

"Dum miaj lerntagoj mi sentis nenian malamemon al sklaveco. Mi ne sciis ke estas io nedeca en ĝi. Neniu ĝin mallaŭdis en mia aŭdo; la ĵurnaloj lokalaj diris nenion kontraŭ ĝi; la eklezio lokala instruis al ni ke Dio ĝin aprobas, ke ĝi estas sanktaĵo, kaj ke la dubanto nur bezonas legi la biblion se li volas certigi—kaj tiam la legaĵoj estis legataj al ni por certigi la aferon; se la sklavoj mem havis malamemon al sklaveco ili esta saĝaj kaj diris nenion."

Antaŭnelonge Mark Twain mirigis la publikon aperante dum ricevo ĉe l' Blanka Domo en Washington en vestaĵo tute el blanka flanelo. Li

anoncis ke li kuraĝas porti tian vestaĵon tial ke li opinias ke ĝi estas pli saniga ol nigra ŝtofo, kaj, ĉar li estas tre amata homo, neniu lin kritikis pro tio. Nur Mark Twain povus fari tiel.

Unufojon, estis sciigoj ke li mortis. Kiam li aŭdis pri tio, li telegrafis: "La sciigoj estas trograndigo."

Jen estas rakonto kiun li mem sciigas:

Li marŝis unufoje en libregon, kaj rimarkante iun libron demandis la komizon pri ĝia kosto.

"Kvar dolorojn," diris la komizo.

"Nu," diris s-ro Clemens, "mi estas ĵurnal-



ŜERCAŬDESIGNAĴO DE MARK TWAIN.

Designita de s-ro Sylvester Anderson por la menuo de vespermanĝo donita de la Pleiades 'a Klubo en New York en honoro de s-ro Clemens lastan januaron.

isto. Ĉu mi ne ricevas rabaton pro tio?"

"Certe," respondis la bonvola komizo.

"Mi ankaŭ estas gazetisto. Ĉu oni elprenas iom pro tio?"

"Jes," diris la komizo. "Vi ricevos rabaton pro tio."

"Mi estas ankaŭ aŭtoro. Ĉu mi ne rajtas ricevi la aŭtoran rabaton?"

"Jes, sinjoro. Vi ricevos la aŭtoran rabaton."

"Aldone, mi havas akciojn en tiu ĉi firmo. Ĉu tio estas rezono por alia elpreno?"

"Jes, sinjoro," la komizo respondis.

"Fine," daŭrigis s-ro Clemens, "mi volas diri ke mi estas Samuelo Clemens. Ĉu tiu ĉi fakto min rajtigas demandi alian elprenon?"

"Ĝi vin rajtigas," diris la komizo, post momenta ŝanceliĝo.

"Bone," respondis la aŭtoro. "Kiom mi ŝuldas al vi?"

"Ni ŝuldas al vi okdek cendojn," diris la komizo.



VOJAĜE AL BERMUDO.
La fama aŭtoro estas nun en la insuloj
por resaniĝi.

Mark Twain estas nun en le Bermudaj Insuloj, kien li iris, antaŭ malmultaj kelkaj tagoj por resaniĝi, ĉar li ne estis ĝuanta bonan sanon. Angloj, same kiel ni, esperas ke li ĝin regajnu, ĉar ilia ricevo de li lastan jaron estis tre amikega kaj plaĉis multe al ĉiuj usonanoj.

Dum antaŭnelongaj jaroj li grade fariĝis pli serioza, kaj liaj lastaj verkoj, "Johanino de Arko," kaj "Kristana Scienco," montras tiun fakton pli klare. Eĉ lia lasta verko pri vojaĝo, "Sekvante la Ekvatoron," kvankam intencita por amuzi same kiel instrui, enhavas tre malmulte da lia antaŭa ŝerca troemeco de priskribo. Tamen, lia aŭtobiografo, nune publikigita en la *North American Review*, ĉiunonate, estas keltempe tre ridetiga.

DAVID H. DODGE.



MARK TWAIN EN LA STRATOJ.
Lin akompanas tie ĉi s-ro Henniker Heaton, fama kritikisto.



LA VESTAĜO BLANKA.
Mark Twain preferas nuntempe porti
vestaĝon el blanka flanelo.

Esperantista Dancistino

ESPERANTO en la piedfingroj? Certe! Kial ne? Ĝi estu ĉie!

Fraŭlino Adeline Genée, la mondfama dancistino, kiu ĵus alvenis New York 'on por danci en la muzika prezentajo, "La Spiritkiso," ĉe l' New York 'a Teatro, sin anoncas esperantistino, kaj ke ŝi tre interesiĝas en la movado en Usono.

"Vi sciu," ŝi diras al intervjuisto el THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, "mi dancadis dum dek jaroj en la Empire Music Hall en Londono, kie la Asocio de l' Naciaj Dancistruistoj antaŭnelonge aprobis Esperanton. Pro tio mi unue serioze ĝin enrigardis, kaj mi konkludis ke ĝi estas tre utila perilo, ne nur por kunigi la gedancistojn el diversaj nacioj, sed ĉiajn popolojn."

Fino Genée estas danino, kaj ŝi parolas kvar lingvojn krom la propran; anglan, francan, germanan kaj italan; nature Esperanto ne estas malfacila al ŝi, eĉ ĝi estus malfacila al iu.

"Mi amegas la dancarton," ŝi diris, "kaj neniam kontraŭas la bison, ĉar mi dancas ĝis mia korpo ne kapablas plu. Estas strange," ŝi aldonis ridante, "ke mia nomo, en la franca lingvo, signifas (kun aldona supersigno) 'lacigita' (génée); estas neeble por mi senti lacecon post eĉ longega danco; mi dancas kiel aliaj personoj spiras."

Adeline Genée, la spertuloj de l' arto danca konfesas, estas la plejglora dancistino kiun la mondo ĝis nun vidis, kaj ankoraŭ ŝi ne estas trofiera nek aroganta.

"Mi opinias ke vi havas mirindajn dancis-

tinojn en tiu ĉi lando," ŝi diris. "Mi ĵus vidis Bessie Clayton'on ĉe la Weber'a Teatro, kaj ŝiaj arto kaj gracieco estas eksterordinaraj."

La stranga afero je Adeline Genée estas



ADELINE
GENÉE

LA MONDFAMA
DANCISTINO

ke, malgraŭ ŝia nemalgranda pezo, ŝi estas tiom ŝajne malpeza dancante. Ŝi ŝajnas venki la fortecon de altera graveco kiam ŝi saltetas aeron, kaj ŝi supreniras kiel plumo en la vento.

Rimarku la leganto ŝian aŭtografon sur ŝia fotografaĵo kaj ŝiajn vortojn: "Korege via por Esperanto." Ŝi tion skribis por THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL dum la intervjuisto parolis kun ŝi ĉe ŝia hotelo.

Nun ke la afero esperanta havas tiel famegan eksponentinon en la teatro, eble novaj rekrutoj trovos ke la lingvo estos endancita en iliajn korojn!

Announcement from Dr. Zamenhof

Just as we go to press there comes, too late to print in full or in Esperanto, a long and important open letter from the inventor of Esperanto, concerning the *Delegacio*. Readers of the April issue of THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL will undoubtedly get the whole of it, but the substance of the missive is contained in the following words:

"The *Delegacio* received from its members nothing more than the commission to choose a language; from the moment that that choice was made the *Delegacio* ceased to exist and remained merely a certain number of private persons, who—

by their own words—had now become Esperantists. But when these new Esperantists, who became allied to Esperanto only a few weeks previously, start to dictate laws to the whole Esperanto people, who have been working for more than twenty years, then we simply ignore them."

Bully for Dr. Zamenhof! As a logician he is as keen as ever. Nothing could be more satisfactory to the adherents of the *Fundamento*. The "importance" of the *Delegacio* as a factor in Esperanto is an exploded bubble, as we have frequently intimated would be the case. D. H. D.

Tre Grava Letero de Edmond Privat

AL THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Estimata Redaktoro:

Permesu ke mi trankviligu kelkajn usonajn amikojn, kiuj ricevis lastatempe dokumenton, kiu ilin eble ĉagrenigis. Kiel ĉiu nun scias, la Lingva Komitato per granda plinombro rifuzis akcepti la lingvajn reformojn de s-ro Ido, kiujn aprobis la "Delegacio." Tiu Delegacio sciigis deklari ke pro sia elekto de Esperanto kiel internacia lingvo, ĝi sin konsideras kiel esperantista, kaj tamen ĝia direktanto, anstataŭ akcepti, kiel ĉiu el ni, la decidon de nia Lingva Komitato, daŭrigas propagandon por ŝanceligi persone la esperantistojn, kaj sendas al ili dubigajn dokumentojn.

Unu el ili estas broŝuro enhavanta artikolojn publikigitajn de d-ro Zamenhof antaŭ dekkvar jaroj en la antikva gazeto *Esperantisto*. En tiuj artikoloj kolektitaj de la mortinta d-ro Javal, la Doktoro demandis la esperantistojn ĉu ili deziras reformojn, kaj prezentis persone siajn tiamajn ideojn pri ŝanĝoj. La esperantistoj respondis: *Ne*; kaj la Doktoro mem konvinkigis ke ŝanĝoj ofte fariĝos baldaŭ malplibonigoj kaj ke la movado estas jam tiel antaŭenigita ke ĝi estas senutila danĝeraĵo konfuzi la tutan aferon por fari similajn lingvajn eksperimentojn. Se jam antaŭ dekkvar jaroj, kiam la esperantistoj estis apenaŭ du aŭ tri mil en la mondo, ili ne volis detrui la faritan laboron, ni hodiaŭ, kun niaj miloj da vivantaj verkaj aldonaĵoj kaj kursoj ĉie en

la mondo, ankoraŭ malpli volonte intencas mortigi ĉion ĉi nur por plezurigi neniam-kontentulojn. Tial en Bulonjo ni aplaŭde akceptis la Deklaracion de d-ro Zamenhof pri lia Fundamento; kaj estus absolute malhoneste kredigi al nebone informitaj samideanoj ke nia Doktoro favoras ŝanĝojn.

Antaŭ kelkaj tagoj li skribis al mi: "konigu kaj klarigu ĉie la antaŭparolon de l' Fundamento." Eĉ tion ni ne bezonas por kredi al la fideleco de nia amata majstro. Kiel multaj el ni, li estas sendube laca de la "parizana disputadoj," kaj multe pli interesiĝas en la laborado de niaj propagandistoj.

La franca fablisto La Fontaine verkis pri "La Muŝo de l' Veturilego"; ĉu en Antida lingvo oni ĝin tradukus per la "Ido de Esperanto?" Tre kore via,

EDMOND PRIVAT.

Pri la Festotago Esperanta

Editor, THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Dear Sir—I am an urgent advocate of July 21, 1887, as the natal day of Esperanto for the following reasons:

1. It is the date assigned in many papers and publications and is already generally accepted.

2. Dr. Zamenhof states that he published his brochure in July, 1887. Why bring in June, May, March or December, which are further from the true date than any July day?

3. Any slight uncertainty of what occurred on July 21, 1887, is of no great importance. July 4, 1776, is *not* the date of signing the Declaration of Independence. The Christian Era is in error four years if we account Christ's birth as the beginning. The general accuracy of July, 1887, as the Esperanto natal month is beyond question. The day of the month may be uncertain. It has already been stated by more or less competent authority as the 21st.

Very sincerely yours, CHARLES W. STEWART.
1211 Kenyon Street, Washington, D. C.

La Blinduloj en New York City


LA ĉefa neceso, pri la zorgo de blinduloj, estas ke ili ne estos lasataj senokupaj. Senokupeco, eĉ kun multaj vidantoj, estas speco de infero; kiom pli ĝi devas esti kun tiuj kiuj ne povas ekzerci siajn animojn aŭ spiritojn per vido al objektoj ĉirkaŭ kaj apud ili!

Tiu ĉi artikolo estas verkita post vizito ĉe l' New York Association For the Blind, kie multo estas farita pro la komforto, spirita kaj korpa, de blinduloj, kaj kie la ĝenerala zorgo por la zorgatoj devas necese renkonti aprobon de ĉiuj.

La sekretariino estas f-ino Winifred Holt, tre bela juna virino, kiu, kune kun sia fratino, f-ino Edith Holt, fondis la asocion antaŭ multaj jaroj kaj observis ĝian kreskadon kun entuziasmo.

Ĝi ne havas ankoraŭ vastegan hejmon, sed

ĝi posedas la kvaretaĝan domon en kiu ĝi loĝas—ĉe 118 East 59a strato—kaj ĝi trovas



SUMIGANTE LA DETALAIN PRI BLINDULOJ.

Antaŭ kiam la New York Association For the Blind havis sian propran loĝejon, f-ino Holt donis la uzon de sia domo al siaj ĝehelpantoj.



LA LABOREJO POR BLINDULOJ.

Tie ĉi la blindaj laborantoj faras seĝojn—bonajn seĝojn. Oni ne falos tra ili!

malmulte da malfacileco ricevi la necesajn sumojn da mono por daŭrigi la bonan aferon.

Simile al f-ino Helen Keller, kaj d-ro Javal de Parizo, f-ino Holt rapide decidis ke siaj blinduloj devas labori por esti feliĉaj, kaj ŝi starigis klasojn por tiaj okupadoj kiaj taŭgas al blinduloj. Sed plie; ŝi ne petas ke oni aĉetu la rezultaĵojn de l' laboro de blinduloj nur tial ke tiuj ĉi estas blindaj, sed tial ke la rezultaĵoj estas bonegaj.

“Niaj balailoj,” ŝi diras, “ne estas nur sufiĉe bonaj balailoj laŭ la prezo; ili estas la plej bonaj balailoj kiujn oni povas aĉeti. Ni ne petas kompaton por vendi la balailojn; ni ilin oferas vendiĝi tial ke ili estas tute valoraj. Se vi ne ilin trovos valoraj, ilin redonu kaj ricevevu vian monon!”

Same pri matoj, korboj, lampŝirmiloj, paj-laj ĉapeloj, globetaĵoj, ktp. Ĉio kiujn faras la blinduloj ĉe la New York Association For the Blind vendiĝas kiel bonaĵo—aŭ ĝi estas forĵetata.

F-ino Holt proponis al mi, duonŝerce, ke eble ŝiaj geinstruatoj ŝatos lerni Esperanton. Mi tuj citis la nomon de s-ro Edward K. Harvey, ŝe Boston, Mass., kiu faris tiom multe pro blinduloj tieaj, kaj la sekretariino respondis ke eble baldaŭ ŝi skribos al s-ro Harvey kaj demandos konsilon pri tiu ĉi punkto.

Jen tio kion diris Mark Twain en letero pri la New York Association For the Blind: “Estas sufiĉe malgaje esti blinda—ĝi estas unutona, unutona vivo pleje. Al ili estas ĉiam nokto; kaj kiam ili deviga sidadi kun plektitaj manoj kaj kun nenio fariĝi por amuzi aŭ gajigi aŭ okupi siajn spiritojn, estas pli kaj pli unutone. Ne devas esti ke ili devi-

ĝu vivadi per almozo. Ni devus doni al ili oportunecon meriti sian panon kaj koni la dolĉecon de l' pano ricevita per la laboro de la manoj.”


S-ro Grover Cleveland, eksprezidanto de Usono, diras: “La New York Association For the Blind entreprenis noblan laboron. Tio kio alvokas al mi plejforte estis la pretigo de l' blinduloj al memsubteno per instruado kaj kuraĝigo. Mi scias, per sperto kaj rimarko, kiom multe oni povas fari en tiu direkto, kaj kiom facile estas, en

la neesto de tia klopodo por blinduloj, insisti ke ili ricevu, pro ilia malfeliĉaĵo, malĉarman almozon.”

F-ino Keller skribas: “La blinduloj ĉie entuziasme ricevas la klopodojn por doni laboron al ili. Ili scias ke malokupado, mal-kuraĝigo kaj soleco for de la aktivagoj de homaro estas siaj realaj ŝarĝoj.”

Kaj s-ro Josefo Choate, fama leĝisto, humoristo kaj antaŭa ambasadoro al Anglujo, diras: “Neniu estas tiel blinda kiel iuj kiuj rifuzas vidi. Bezoniga helpo, kaj rapide.”

RICHIE LONG.



BLINDECO NE MALPLIVALORIGIS LIN.

Li estis barbiro antaŭ kiam li blindiĝis, kaj li daŭras esti sperta. Sed kiu rifuzas laŭdi la kuragon de l' razito?

The American Esperanto Journal

MARTO, 1908

No. 15

Redaktoro, - - - - DAVID H. DODGE

LA KRESKADO DE IDEO estas ĉiam interesa, same kiel la kreskado de kreskaĵo. Unue, ambaŭ paŝetas en la mondon timeme kaj ĉirkaŭrigardas kvazaŭ peti pardonon por ilia nura ekzisteco. Tiam, grade, ili grandigis, senkonscie, kaj baldaŭ ili trovas ke fortikeco estas akirita. La atakoj de l' elementoj naturaj aŭ de kontraŭuloj eble ilin malfortigas, sed ne ilin mortigas, kaj fine ili atingis plenkreskecon kaj staras fiere, timante nenion aŭ nenium.

Tiel estas pri Esperanto. Antaŭnelonge la esperantiston oni konsideras kiel specimenon de maldanĝera frenezulo, kiu int'resiĝas en afero absurda kaj senutila, kaj kies tempon li devus uzi al plibona celo. Sed nun, preskaŭ ĉiu konfesas, eĉ malbonvole, ke "estas iom en Esperanto."

Ni konas iun personon kiu, aŭdante unuafoje pri la lingvo, ridegis kaj proponis ke ni ĝin uzis por kunparoli kun la sciuroj en la parko. Sed, anstataŭ respondi akre, aŭ sarkasme, ni grandanime donis al li ŝlosilon ĉefeĉan. Post ĉirkaŭe unu monato ni lin renkontis ree. Tuje li sciigis entuziasme al ni ke li abonis sep gazetojn esperantistajn, kaj malhelpis al ni trafi nian vagonaron tial ke li insistis diskuti dum duonhoru diversajn punktojn gramatikajn. Efektive, la tempo ridi je Esperanto tute forpasis. Oni povus ridi, kun egala justeco, je aritmetiko, aŭ pantolonŝelkoj—aŭ io utila.

* * * *

THERE ARE EVIDENTLY several Esperantists in this country who do not quite thoroughly grasp the point as to the idea of strict adherence to Dr. Zamenhof's *Fundamento*. They seem to think it means that nothing new is to be admitted into the language, no matter what the exigency may be or what the progress of events may demand. We are not disposed to criticize such persons for taking

this erroneous view of the matter, for they may not have in their possession a copy of the *Fundamento*, in the Introduction to which the point is made quite plain by Dr. Zamenhof himself. We only advise very strongly that they get the book and read it carefully. In the meanwhile, a few remarks may make the matter clearer.

* * * *

FOR INSTANCE, the word *plumo* means either "a pen" or "a feather," and *literaro* may be translated by "a set of type," or "a collection of the letters of the alphabet." In either case, and in similar cases, the context is almost sure to explain which translation is proper, but the fact of there being any doubt at all is unsatisfactory to many conservative Esperantists, and rightfully so. Any Esperantist has the right to coin a separate word for either "a pen" or "a feather"—and other Esperantists have the equal right to adopt or reject it. This is why it behooves earnest students and experts of the language to restrain themselves when incited to invent a word that may be plain to persons of their own countries, but quite incomprehensible to others on account of its lack of internationality. The proposer, however, is not doing anything prejudicial to the Boulogne Declaration, as embodied in Dr. Zamenhof's Introduction. He is merely coining a new word. If the suggestion is good the coin will become current; otherwise, not. Esperantists know a good thing when they see it.

* * * *

BUT IF THE INNOVATOR proposes to discard the accusative *n*, or to use another suffix instead of *ec* to indicate the abstract quality; or if he suggests overhauling the Esperantist alphabet to the end that the accented letters (or their equivalent with the added *h*) be abandoned, he then is contravening the *Fundamento*, and is likely to find himself extremely unpopular, not to say ridiculous. In the first case, he makes a suggestion which, if followed, enriches the language; in the last cases he proposes upsetting what has been proved quite satisfactory for twenty years. The whole of Esperanto literature up to date has been built on ideas condensed in 1905 in the Boulogne Declaration, ideas weighed carefully in the exquisite balance of experience and not found wanting. The mere idea of rendering nugatory all this work is absurd in itself, and those who are obsessed by it have neither a sense of proportion, nor of humor.

* * * *

MANY NEW WORDS have been added since the Declaration, and been welcomed, and one new suffix (see page 48). THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL in this number adopts a new word meaning "type," from the German *Schrift* (see page 47), for which we thank *The British Esperantist*, which uses it in its February issue. We adopt it temporarily only; something better may be used universally later on, but the word will do for the nonce. We also think—personally—that a new word is needed for "business;" if continental Esperantists like *businesso*, pray let them accept it with our compliments. We have not used it yet, and are sufficiently conservative to pause before doing so, particularly so in view of the change of editorship, but that a new word, as distinct from *aferoj*, is needed is beyond question.

Pri la Vorto Usono

AL THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Estimata Samideano:

Eble al mi apartenas la honoro, esti la esperantista baptopatro de via lando. En mia libreto *Historio resuma de l' Arbitracio konstanta*, verkita dum la somero de 1904, kaj eldonita en januaro 1905, mi faris efektive la jenan proponon, represitan poste sub la rubriko *Vorturo Pacifisma* en la unua numero de *Espero Pacifista* (julio 1905):

“**Amerikano**, kiu koncernas speciale Unuigitajn Ŝtatojn, aŭ ilian loĝantaron—**Amerikano**, regnanto de Unuigitaj Ŝtatoj.—Vidu: **Usono**.

“**Usono**, Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko.—Strange estas, ke ekzistas neniu nomo por la regnantoj de Unuigitaj Ŝtatoj kaj por ilia nacio. Oni nomas ilin, ĝenerale, **Amerikanoj**; sed tiu nomo estas evidente malpreciza.

“De kelkaj jaroj, oni komencas, en Unuigitaj Ŝtatoj, nomi la landon per la nomo *Usona*, kunmetita per la ĉefliteroj de la vortoj *United States of North America* (Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko); tio, kio koncernas la landon, estas *usonian*, kaj, simile, la regnanto estas nomata *Usonian*. (Same, la konata moknomo *Uncle Sam* (Onklo Sam) devenis de la oficiala mallongigo U. S. Am.).¹ Tiuj nomoj, tre oportunaj kaj bonsonaj, ŝajnas esti disvastigotaj kaj oficiale akceptotaj.

“En Esperanto, mi proponas nomi la landon **Usono**; la responda adjektivo estus *Usona*, kaj la regnanto *Usonano*.

“Eble oni povus diri *Usonujo* aŭ *Usonlando* por la regno, kaj *Usono* por la regnanto. Sed la ĉi superaj vortoj ŝajnas al mi preferindaj.”

Principe, mi uzas en *Espero Pacifista* novajn vortojn, nur en okazo, se, el teknika vidpunkto, ili estas necesaj, por esprimi ideon, por kiu mankis ĝis nun speciala esprimo. Pri **Usono**, kiel ajn necesa ŝajnis al mi la enkonduko de vorto signifanta “regnanto de Unuigitaj Ŝtatoj,” oni povis atendi almenaŭ ĝis kiam la koncernataj esperantistoj, t. e., niaj amikoj el tiu lando, estos konigitaj sian opinionon. Mi ne uzis do tiun nomon, kaj daŭris, provizore, diri “Unuigitaj Ŝtatoj” kaj “Amerikano.” Sed, en la septembra numero, mi faris

¹La devego de “Uncle Sam” estas aparta afero. La entreprenisto, dum nia milito kontraŭ Anglujo, nomiĝis Elbert Anderson; li provizis nutraĵojn al la militistaro. Liaj skatoloj estis stampitaj “E. A.—U. S.” La nomo de l' inspektoro de l' nutraĵoj estis Samuel Wilson, kiun militistoj ame nomis “Uncle Sam.” Unu ŝercema militisto klarigis ke la literoj U. S. rilatis ne al la Unuigitaj Ŝtatoj sed al “Uncle Sam,” la inspektoro, kaj la ŝercaĵo restis.

eksperimenton: ĉar la vorto **Usono** troviĝis en la titolo de mallonga noto tradukita de unu el niaj kunlaborantoj, mi lasis ĝin, por ekscii kiun efekton ĝi faros, ĉar oni devis ĝin rimarki, pro tio, ke ĝi estis presita per dikaj literoj.

La sola efekto estis malaproba letero de s-ro Twombly,² kiu, versimile, ne estis leginta mian unuan noton, kaj rimarkigis al mi (kion mi sciis), ke la nomo **Usona**, ĝis nun, estas uzata malofte kaj precipe kiel ŝerco. Pri tio, mi respondis per la jena vortara noto, en la decembra numero de la sama jaro 1905:

“**Usono**.—La uzo de tiu vorto, en nia septembra numero, estis tre kritikata en letero de s-ro Twombly. Ni scias ke oni povas fari kontraŭ ĝi tiun kontraŭparolon, ke ĝi ne estas oficiale, eĉ nek ĝenerale uzata en Unuigitaj Ŝtatoj mem. Tial, en la unua parto de tiu vortaro, mi proponis ĝin nur por la estonto, konservante, por la estanto, la vorton *Amerikano*, por montri la regnantojn kaj loĝantojn de Unuigitaj Ŝtatoj; kaj la vorto **Usono** estis uzata nur unufoje en la revuo, de kunlaboranto kies tekston oni ne ŝanĝis. *Amerikano* havas la duoblan malutilon, ke oni ne komprenas ĉiam la diferencon inter ĝi kaj *Amerika*, kaj ke ĝi donas neniun nomon por la regno mem. Kelkaj personoj, mi scias, diras *Unuiĝo* kaj *Unuiĝanoj*, kio, ankaŭ, ne estas tre bona. Stranga situacio, tiu de lando kaj popolo sen nomo!”

Sed nun, kiam la vorto **Usono** estas uzata de d-ro Zamenhof, mi opinias ke la estonto, kiun mi aludis en la ĉi supra noto, estas alveninta; kaj mi konsideras do **Usono** kaj **Usonano** kiel enkondukitaj por anstataŭi la maloportunan *Unuigitaj Ŝtatoj* kaj la neprecizan *Amerikano*.

Mi devas aldoni ke mi scias, ke s-ro Sam. Meyer, el La Rochelle, faris la saman proponon, sed mi tute ne memoras, je kiu epoko. Versimile, le respondos ankaŭ al via demando. Sed, kiu ajn el ni estas kronologie la unua, ĉiu, prezentante sian proponon, ne konis la ideon de l'alia. Ni povas do ambaŭ pretendi la titolon de elpensinto: cetere, du baptopatroj ne estas troaj por tiel granda kaj grava lando!

Pri via demando, ĉu oni devas diri **Usono**

²Nia amiko estis nun kun ni. S-ro Twombly aprobas *Usono*. Vidu lian amikan leteron en la februaro numero.—Red. A. E. J.

au **Usonujo**, mi esprimis mian preferon en la unua suprecitita noto. Mia motivo ne estas nur la kompara mallongeco de **Usono**, sed ankaŭ la esenco de la sufikso *uj*. La nomo *Usonujo* signifus, ke via lando estas loĝata de etnike aparta gento, aŭ de popolo parolanta apartan lingvon, propran al ĝi, kaj ke la lando ricevis la nomon de la dirita gento aŭ lingvo. Tia ne estas la okazo, ĉar la Usonanoj estas ja unu el la plej miksitaj popoloj en la mondo, kaj parolas plimulte kaj oficiale la lingvon de le angloj. Al mi ŝajnas do ke oni devas diri *Anglo, Anglujo, Franco, Francujo, kaj Portugaljo, Portugalujo*, sed *Usono, Usonano*, same kiel *Brazilo, Brazilano*.

Ekzistas laŭvere en Europo du landoj, Belgujo kaj Svisujo, kies nomoj ne respondas al la ĉi supraj difinoj. Sed vi scias, kiel fortaj estas la naciaj kontrastoj kaj kontraŭstaroj en nia malfeliĉa Eŭropo. Ambaŭ popoloj, la Belga kaj la Svisa, havas, de multaj centjaroj, tiel apartan karakteron kaj historian individuecon, ke, kvankam tute malhomogenaj, ili formas kvazaŭ unuecaj gentoj; kaj la nomo Belgoj estis cetere tiu de antikva gento, kaj Belgujo tiu de Norda Gallujo.

Resume, oni devas diri, laŭ mi, **Usono** kaj **Kanado** por la du nordaj landoj de Nordameriko; por la suda, kies nomo venas de ĝia ĉefurbo, mi konsilas diri *Meksiklando*.

Kredu mia, estimata sinjoro, sincere via,
GASTON MOCH.

Redaktoro de *Espero Pacifista*.
Neuilly-sur-Seine, Francujo.

AL THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Estimata Redaktoro:

Vi petas kritikon pri la vorto **Usono**, kaj tial mi kuraĝas skribi pri ĝi. Oni ofte diras pri Esperanto mem ke ĝi ne estas teorie perfekta, sed ke ĝi ja estas praktika, kaj tio ĉi estas la plej grava afero. Ĉu eble oni ne povus diri same pri **Usono**? Certe, ĝi ne estas teorie perfekta, sed ĝi certe estas praktika, kaj eĉ preskaŭ la sola proponita formo kiu estas praktika. Ni certe ne rajtas alproprigi la nomon Ameriko, kaj estas aliaj "Unuigitaj Ŝtatoj" eĉ en Ameriko mem; ekzemple, la U. S. de Kolombio en Suda Ameriko. **Usono** estas belsona kaj oportuna, eĉ se oni povas demandi, kie estas Ameriko? Ĝi estas jam komprenata, ĉar mi kelkfoje ricevis leterojn en kies adreso ĝi estas uzita. Mi konfesas, ke mi ne tute ŝatis ĝin, kaj jam parolis kontraŭ ĝin, sed mia opinio ŝanĝiĝis post iom da pensado.

Philadelphia, Pa. LEWIS B. LUDERS.

AL THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL:

Estimata Redaktoro:

Unue, mi ne pensas ke "Unuigitaj Ŝtatoj" estas ĝusta termino, ĉar la unio inter niaj ŝtatoj ankoraŭ daŭras; tial "*Unuigataj*" estus pli taŭga esprimo. Sed, kiu *igis* nin unu? Neniu! Ni mem *unuigis*. Tial, mi prefere dirus "Unuigantaj." Nia unuigo estas daŭra eco, mi pensas. Tial, la ĝusta esprimo estas "Unuigaj Ŝtatoj." Sed el tiu-ĉi, adjektivo ne estas farebla, kaj **Usono** bezoniĝas.

Brooklyn, N. Y. WM. J. PHOEBUS.

Ĉu Profitas Pruntepreni la Gazeton de Via Najboro?

Viro, kiu estis tro ŝparema aboni al sia hejma gazeto sendis sian filon por pruntepreni ĝin de lia proksima najboro. Dum sia rapido, la junulo renversis abelujon valoritan je kvar dolaroj kaj post dek minutoj li similigis al veruka kukurbo.

Liaj kriegoj atingis al lia patro, kiu kuris al lia helpo, kaj, ne vidinte dentmetalfadenan palisaron kuris en ĝin, elŝirante manplendon da karno el sia anatomia kaj ruinigante kvar-dolaran pantalonon. La maljuna bovino ekprofitas per la truo farita en la palisaro, eniris la proksiman kampon kaj sin mortigis, manĝante nematuran grenon.

Aŭdante la konfuzon, la edzino elkuris, renversante kvingalanan sitelon da kremo en korbon de katidoj kaj dronante ĉiujn. Dum ŝia rapido ŝi lasis fali siajn falsajn dentojn valoritajn je dudek kvin dolaroj.

La infano, senatentata, rampas tra la disverŝan kremon en la salono kaj difektiĝis dudekadolaran tapiŝon.

Dum la ekscitego, la plejmaljuna filino forkuris kun la dungato, la hundo diskunigis la sidintajn kokinojn, kaj la bovidoj eliris kaj formaĉis la vostojn de kvar bonegaj ĉemizoj.

Moralo: Aĉetu vian ĵurnalon—precipe la esperantan! *Esperantigis* G. C. GEARN.

General Chronicle

District of Columbia

